

Johann Wolfgang von Goethe,
Same tiel

tradukita de Richard Schulz

Super ĉiuj montoj
Trankvil',
Kaj ĉiuj fontoj
Sen babil';
Aŭdas vi ne
Birdetan ĉirpon arbare.
Pensu prepare
Pri la pere'!

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlid)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26).*

Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)

Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

Johann Wolfgang von Goethe,
Egalaĵo (Noktokanto de migranto)

tradukita de Manfredo Ratislavo

Super ĉio iĝas
Kviet',
Kaj ne moviĝas
Pro ventet'
Iu foli';
Silentas la birdoj ĉirkaŭe.
Atendu – baldaŭe
Ripozos vi.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlid)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-01.*

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)

Johann Wolfgang von Goethe,
Same

tradukita de Pejno Simono

Super montopintoj —
silent',
tra pinopingo
la senvent'
spiras sen fort';
arbare la birdoj ekmutas.
Pretu, aludas
silento pri mort'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlid)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, *1941-12-23).*

Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.